*Eŭropo Demokratio Esperanto*

Eŭropo Demokratio Esperanto (EDE) estas politika movado kiu naskiĝis en Francio kaj Germanio en 2003. Tiu civitana movado sukcesis partopreni la eŭropan baloton en junio 2004.

Milionoj da francoj vidis filmetojn pri Esperanto sur la naciaj televidaj kanaloj.

Dank'al tiuj senpagaj filmetoj kaj al la afiŝoj kaj gazetaj artikoloj, EDE ricevis 25 000 voĉdonojn. Multaj el tiuj voĉdonantoj ne estas esperantistoj sed simple opinias ke Esperanto estas bona ideo kaj ke ĝi estas utila por Eŭropo.

Por konstrui la Eŭropan Union, por ebligi debaton inter eŭropaj civitanoj, ni devas proponi demokratiajn ilojn. La unua estas Esperanto.

# esperanto 2009



## Kiel partopreni nian agadon ?

- aliĝi la retliston de EDE,
- starigi lokan diskutliston,
- starigi EDE-asocion/-partion kun samideanoj en sia lando,
- publikigi artikolojn/agadalvokojn en lokaj, landaj Esperanto-gazetoj,
- partopreni konferencojn pri lingva politiko, prezenti la vidpunkton de EDE tie,
- dissendi gazetarajn komunikojn,
- disdoni flugfoliojn okaze de prilingvaj, pri-eŭropaj aranĝoj...

## Ĉu pretaj por 2009?

La venonta eŭropa baloto okazos en junio 2009. Tiam la movado Eŭropo Demokratio Esperanto planas partopreni la baloton en multaj eŭropaj landoj. Tial via kunagado estas bezonata!

La efiko de balota kampanjo estas grandega: ĝi ebligas sendi balotilojn kaj informilojn al ĉiuj voĉdonantoj de iu lando. Tuteŭropa balota kampanjo estas la plej vastskala kaj efika reklamkampanjo por niaj ideoj.

La Eŭropa Unio bezonas novan iniciaton por pli bona integriĝo de la civitanoj. La debatoj kaj ideoj ne plu estu limigitaj je la nacia skalo. Ni proponu alian Eŭropon, pli partoprenigan!

## Kiel kontakti EDE ?

Skribu al kontakto@e-d-e.org
Retejo: www.esperanto2009.eu
Poŝtadreso:
EDE, 8 rue de Cotte, FR-75012 Paris
Telefono: +33 668 33 78 14

Por aliĝi la retliston de EDE, sendu malplenan mesaĝon al:
ede-eu-subscribe@googlegroups.com

Se vi deziras monsubteni EDE, ĝiru al nia UEA-konto: edee-k

Se la projekto **Eŭropo Demokratio Esperanto** interesas vin, plenigu la formularon:

Nomo:

Lando:

Retadreso: